KELECO organo de Astura Esperanto Asocio

n-ro 34 (5) SEPTEMBRO – OKTOBRO/83

ESTRARO DE A. E. A.

Prezidanto: S-ro Santiago Mulas
Vicprezidanto: S-ro Adonis González
Sekretario: S-ro Luis Muñiz
Kontisto: S-ro Manuel Fernández
Kasisto: S-ro Ildefonso Domínguez
Bibliotekisto: S-ro Julio Argüelles
Gekomitatanoj:
F-ino Pilar Alonso
S-ro Gervasio Colunga
S-ro José Ordieres
S-ro Faustino Castaño
S-ro Antonio Román

ADRESO DE A. E. A.

Str. Enrique Cangas, 25
Telefono, 341918 GIJON – 6

ENHAVO

PRI LA "JUBILEO" DENOVE

Jes. Mi parolos denove pri la "Jubileo", ĉar temas pri evento, kiu signas ĝravan mejloŝtonon en la vojo de la Esperanto-Movado. Vojo ja malglata, kie Ni, esperantistoj, ofte troviĝas antaŭ malhelpoj kiuj baras ĝin kaj kiuj eĉ okazigas portempan stagnadon de Nia Movado. Kiel plej grava malhelpo elstaras Milito, laŭ atestas la du Mond-Militoj.

La nuntempa esperantistaro, ĝenerale, revas pri la nedubeble grandioza Universala Kongreso, kiun oni organizos por inde festi la "Jubileon", kaj samtempe sin pretas por ĝin partopreni. Sed...ĉu Ni ĝisvivos la daton de la "Jubileo"?

La lastaj okazaĵoj en la internacia politika vivo nur malbonoj aŭguras, kaj mi timas ke nia Mondo estu denove dronigita en sanga brulofero, kiu pereigos la tutan "civilizacion" realigante veran konflagracion.

Mi opinias, ke la plej grava tasko staranta nuntempe antaŭ la Homaro estas gardi la PACO-n, eviti Militon. La PACO estas afero, kiu tuŝas la tutan Homaron, sendistinge de politikaj ideologioj, religiaj kredoj, haŭtkoloroj, lingvoj, k.s. Antaŭ la problemo pri PACO oni ne povas resti neŭtrala!

Do, la tuta Homaro, sed des pli Ni esperantistoj, devas NEPRE batali por la PACO! Se ni deziras ĝisvivi la "Jubileon"; se Ni deziras ke la "nepoj nin benu", Ni konsciu bone la gravecon de la nuntempa monda krizo kaj agu konsekvence. Okaze de nova Mondmilito, kiu certe temus pri La Lasta Mondmilito, ĉar neniu postvivus ĝin, al kiu utilus Esperanto, al kiu utilus io ajn...?

Nia Majstro iniciatis Esperanton por disfaligi la lingvajn barojn...inter la popoloj dividitaj... kiel ilo de PACO!

ADONIS.-

NIA ANTENO

De la 21-a ĝis la 25-a de Julio ĉi-jara okazis, en Zaragozo, la 43-a Hispana Kongreso de Esperanto. Nia Asocio estis reprezentata, en tiu Kongreso, per 10-persona grupeto da gesamideanoj, kiuj ekveturis en Zaragozon pervagonare frue en la mateno de la 20-an. En ĉi tiu sama tago okazis la "Interkona Vespero", kiu montriĝis bonaŭgura komenco de nia 43-a Kongreso. Antaŭ ol okazigo de la "Interkona Vespero", estis malfermata interesa "Filatela Esperanto-Ekspozicio" fare de S-ro. Bielsa, kaj prezentata per trafa paroladeto far S-rino Urueña, Prezidantino de nia Hispana Esperanto-Federacio.

La 21-an, je la 9-a h. 30′, la HEF-estraro kunsidis kun Delegitoj kaj Reprezentantoj de E-Grupoj. Oni pritraktis diversajn aferojn, tiel pri la 43-a Kongreso mem, kiel pri interesaj temoj kiuj rilatas la estonton de nia enlanda Movado.

Je la 11-a h. 40′ okazis la Solena Malfermo de la 43-a Hispana Kongreso de Esperanto. En la podio sidis aŭtoritatuloj kune kun HEF-estraranoj. Tuj post la oficiala Malfermo, la Kongreson salutis reprezentantoj de diversaj nacioj; ja unu el la karakterizoj de la 43-a estas ĉeestado de multaj eksterlandanoj, kiuj internaciigis la etoson de la Kongreso.

La Programo de la Kongreso, kvankam eble ampleksa kaj ambicia, disvolviĝis glate kaj kontentige, pro kio oni nepre devas gratuli ĉiun LKK-anon. Ĉiu programero okazis sufiĉe akurate, kaj ĉiu havis sian apartan intereson. Tiel la parolado de S-rino Urueña pri la Kongresa Temo, nome "Komunikado", kiel la Folklora Festo, arte prezentita de la fama Grupo "Aragona Bastiono"; samkiel la viglaj diskutoj dum la Ĝenerala Kunveno de HEF kaj la interesegaj Simpozioj, unu pri "Komunikado", la alia pri "Centjara Jubileo de Esperanto".

Unuvorte: la 43-a estis Kongreso, kiu nedubeble plaĉis al ĉiu partopreninto; kiu espereble estu fruktodona kaj progresiga por nia enlanda Movado, kaj ĉe kies fino oni iomete melankolie adiaŭis unu la alian per forta ĜIS LA!... En Seviljo!

= 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 =

Jen la Konkludoj aprobitaj en la 43-a Hispana Kongreso de Esperanto.

1-e. - Profitante la partoprenon de Latinamerikaj reprezentantoj en la Kongreso, oni konsentas ampleksigi kaj intensigi la kontaktojn kun la Esperantistaj Organizaĵoj en tiuj landoj.

2-e. - Okaze de la Deklaracio de la Unuiĝintaj Nacioj pri la INTERNACIA JARO DE KOMUNIKADO, la geesperantistoj konkludas, ke ne estas ebla internacia komunikado sen neŭtrala lingvo, en la diverspopolaj rilatoj.

3-e. - Konsiderante la bezonon ke la ekzamenoj de Esperanto atingu la plej altan nivelon, oni akceptas starigi Universitatan Komisionon tiucele.

4-e. - Intensigi la komunikadon por plibonigi la interrilatojn inter la diversaj generacioj de esperantistoj, profitante la sperton de la veteranoj kaj la viglecon de la gejunuloj.

5-e. - Gratuli la Universitaton de Santiago de Compostela kaj Profesoron Alonso Nuñez kaj komisii la Estraron de HEF por la realigo de la Internacia Preuniversitata Kurso pri Matematiko, Kemio kaj Fiziko en Esperanto.

6-e. - Plibonigi la helpon de la esperantistaro al la Organizaj Kongresaj Komitatoj por ke ili povu realigi pli fruktodonan laboron.

7-e. - Starigi Jubilean Komisionon por la Centjara Datreveno de Esperanto, okazonta en 1.987-a, kiu inde preparu tiun eventon.

... / ...

... / ...

8-e. - Esprimi nian dankemon al la Aragonaj aŭtoritatuloj, precipe al la Zaragoza urbestraro; Provinca Delegacio de la Ministerio pri Transporto, Turismo kaj Komunikado; Ŝparkaso de Zaragoza, Aragón kaj Rioja; Ŝparkaso "La Inmaculada", kaj ceteraj instancoj kaj personoj, kiuj efektivigis ĉi tiun Kongreson.

= 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 =

Dum la lasta dumonata periodo nia Asocio montriĝis tre vigla, kvankam bedaŭrinde kaj kiel kutime, dank' al sinofero fare de nur manpleno da gesamideanoj.

La Estraro, tiucele kunvokita, vigle diskutis pri la Esperanto-Kursoj por la lernojaro 1.983/84. Oni decidis malfermi la Elementan Kurson en la 17-a de Oktobro, kies gvidanto estos (vi ja ĝuste divenis!) nia s-ano kaj Prezidanto Santiago Mulas Gallego. La klasoj okazos lunde, merkrede kaj vendrede, de la 20-a ĝis la 21-a horoj, en klasĉambro de la Katedro "Jovellanos" de Universitata Disvastigo, sidejo de nia Asocio. Kiel lernolibron oni elektis "Junul-Kurso" Pri la Perfektiga Kurso oni alprenis la jenajn decidojn: Komenco la 18-an de Oktobro; tagoj marde kaj ĵaŭde; horaro de la 20,15 ĝis la 21,15 h., kaj lernolibro "Nuevo Método de Esperanto". Jes. Vi pravas. Gvidanto s-ano Adonis González Meana.

La Elementan Kurson ni antaŭtempe anoncis per allogaj dukoloraj afiŝoj, kiujn ni lokigis en diversaj montrofenestroj de nia urbo. Ankaŭ Radio Gijón informis pri nia Kurso, samkiel la loka ĵurnalo. Tamen, tri tagoj antaŭ ol la oficiala malfermo de la Kurso, nur UNU persono estis aliĝinta ĝin! Memkompreneble, ni estis iom malkuraĝigitaj. Sed, la unuan tagon jam ĉeestis dek gelernantoj kaj poste aliĝis ankoraŭ tri; do, nun tiu Elementa Kurso estas instruata al, ni povas diri, ideala nombro da gelernantoj.

La Perfektigan Kurson partoprenas ok entuziasmaj gesamideanoj, kiuj, espereble, baldaŭ vigle parolos Esperanton.

Grava fakto, laŭ propaganda vidpunkto, estas disponigo al nia Asocio, fare de la Direkcio de la Komerca Ĉambro de Gijón, de stando en la urba Foirejo. En tiu stando ni informos pri Esperanto dum la daŭro de la tiel nomata "Mercaplana" Por-Infana Vintra Salono, de Oktobro ĝis Aprilo, kiu estas malfermita sabate, dimanĉe kaj festotage.

En nia stando kaj en la menciitaj tagoj oni povas vidi kaj foliumi esperantajn librojn kaj revuojn, afiŝojn, bildkartojn, ktp. Ankaŭ estas aĉeteblaj lernolibroj, vortaroj, k.s.

Super la stando, kaj videbla de ĉiu angulo de la Foirejo kaj el ekstere, flirtas nia Flago. Kaj ĉe la lintelo, sur granda tabulo, oni povas legi en Esperanto kaj en hispana lingvo "ESPERANTO, unu Lingvo por ĉiuj".

Ankaŭ estas farataj nun preparoj por la alproksimiĝanta "Zamenhof-Tago", kiun ni festos la 18-an de Decembro ĉi-jara, okaze de la 124-a datreveno de la naskiĝo de nia Majstro.

Por tiu evento estas nia intenco realigi iomete ambician programon, kiu certe plaĉos al ĉiuj kaj pri kiu ni informos siatempe. Sed, por ke nia programo, krom plaĉa kaj interesa, estu brila kaj sukcesa ni bezonas vian kunlaboron per ĉeesto en la koncernaj aktoj. Do, ni kalkulas je vi.

= 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 =

Ni memorigas vin pri tio, ke en nia Biblioteko estas disponeblaj diversaj libroj kaj revuoj per kies legado certe vi pliperfektiĝos en Esperano.

Ni informas al vi, ke en nia Sekretariejo vi povas akiri biletojn de la n-ro 17.084, de la Nacia Loterio, por la lotado okazonta la 22-an de Decembro en Madrido.

ADONIS.-

La verda komisarejo



OFICIALA KOMUNIKO

La numero 33 de "HELECO" estis objekto de grava invado far la lingvoteroristoj ĉiaspecaj, kelkaj el ili venintaj el l'eksterlando. Tio devigis la membrojn de la nova taĉmento, t.e. "Verdastelo" resti en la distrikto de "HELECO" por kunlabori kun la tiea taĉmento "Zamenhof". Post intensa komuna deĵorado,ambaŭ efikegaj policanaroj sukcesis aresti konsiderindan nombron da tiaj deliktuloj, kies nomoj kaj fiagoj aperas en la jena listo.

ARESTITOJ EN LA PAĜO 3ª

La t.n. BASENOJ,kiu uzurpas la rolon de s-ro NAĜEJOJ en la 10ª linio.

La t.n. TREJNADO, kiu, post uzurpado de la funkcio de sia parenco TREJNIĜO en la linio 14ª, ripetis la saman fiagon en la linio 35ª.

La t.n. NOME, kiu, post uzurpado de la posteno de la skipo EN LA NOMO DE en la linio 29ª, ripetas tiun saman delikton en la linio 45ª.

La t.n. NAĜANTINO, kiu, en la sama linio, uzurpas la taskon de s-ino NAĜISTINO kaj, poste, adaptiĝinte al la cirkonstancoj por alpreno de la finaĵo j, ripetas similan fiagon en la linio 34ª.

La t.n. ŜIAJ, kiu, en la linio 35ª, uzurpas la okupon de s-ro SIAJ.

Krom tio, oni daŭre serĉas s-inon ŜI, kiu neklarigeble forestas inter aŭ apud s-roj ANKAŬ kaj PARTOPRENIS en la linio 32ª.

ARESTITOJ EN LA PAĜO 5ª

La t.n. AVANTAĜOJ, kiu, en la linioj 6ª kaj 7ª de la unua kolumno, kuraĝas neleĝe alpreni la finaĵon "n".

La t.n. TEDIGAS, kiu en la sama kolumno, linio 8ª, uzurpas la profesion de sia parenco TEDAS.

La t.n. SIA kaj SUBSKRIBO, kiuj, en la kolumno dua, linio 1ª,ne portas la devigan finaĵon "n".

La t.n. SENLABORA kaj MASONISTO, kiuj, en la sama kolumno, linioj 4ª kaj 5ª, sin ornamas neleĝe per la finaĝo "n".

La t.n. MOVIGI, kiu, en la sama kolumno, linio 52ª, uzurpas la metion de s-ro MOVI.

ARESTITOJ EN LA PAĜO 7ª

La t.n. NOMIĜIS, kiu, en la linio 13ª uzurpas la agadon de s-roj ESTIS kaj NOMATAJ.

La t.n. BILDOJ, kiu, en la linio 17ª aperas sen la deviga finaĵo "n".

La t.n. TURNIĜIS, kiu en la linio 18ª, uzurpas la lokon de s-roj SIN kaj TURNIS.

La t.n. ARMIULOJ, kiu, en la linioj 20ª kaj 23ª, uzurpas la taskon de s-ro ARMITOJ.

(daŭrigo sur la 5ª paĝo)

Epokfaranta Evento

En la kadro de la ĵus okazinta 43-a Hispana Kongreso de Esperanto, en Zaragozo, fondiĝis FONDAĴO " L.K.K.K.K. " (La Kongresano kiu konstante kontraŭstaras).

Gvidprincipo de ĉi tiu Fondaĵo konsistas je tio, ke ĉiuj decidoj NEPRE devas esti akceptitaj "unuanime". Tamen, tiu ĉi Principo - ne prezentas gravajn malhelpojn, ĉar la koncernan estraron konsistigas nur UNU persono (ja tiel "UNU-anime"), kiu "unuanime" elektiĝis kiel Prezidanto, Sekretario, Kasisto kaj Ge-komitatanoj (ne ekestu - konfuzaj pensoj pro tiu "Ge" !).

Kunveninte tuj post ĝia fondiĝo, en la sama "kadro" de la Kongreso sed en aparta anguleto, FONDAĴO "L.K.K.K.K.", kies ĉefa celo estas spronigi "ĝis-mortan-sindediĉon-en-servo-de-Esperanto", unuanime aljuĝis la premiojn "Lo-Kvar-Ko 83".

Premiitaj personoj kaj koncernaj premioj estas jenaj:

1-a Premio, STELO EL ĈOKOLADO, al S-ino.Rafaela Urueña Alvarez.

2-a Premio, STELO EL ORANGO, al S-ro.Viktor Ortiz Gratal.

3-a Premio, STELO EL CITRONO, al S-ro Luis Hernández García.

Tiujn supre menciitajn premiojn, kvankam jam aljuĝitaj, oni transdonos al la distingitaj personoj, dum Solenega Akto, en la kadro (ĉiam oni tiajn gravajn aĵojn devas dece "enkadrigi" !) de la 44ª Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta en Seviljo, kaj laŭeble precize EN LA 18-a DE JULIO !

ESTRARO DE FONDAĴO "L.K.K.K.K."

(daŭrigo de la 4ª paĝo)

La t.n. TIE, kiu, en la linio 24ª uzurpas la metion de s-ro TIEL.

ARESTITOJ EN LA PAĜO 8ª

La t.n. FAJROJ, kiu, evidente kontraŭleĝe, aperas en la linioj 2ª kaj 3ª sen la deviga finaĵo "n".

La t.n. ETENDIGITAN, kiu, en la linio 14ª, akaparas la oficon de sia parenco ETENDIGANTAN.

La t.n. EKGOJIĜIS, kiu, en la linio 17ª, uzurpas la metion de sia parenco EKGOJIS.

La t.n. MALSUPRE, kiu, en la linio 19ª tute neleĝe portas la finaĵon "n".

La t.n. LEVIGINTE, kiu, en la linio 37ª, akaparas la taskon de s-ro LEVANTE.

ARESTITOJ EN LA PAĜO 9ª

La t.n. GOJIĜIS, kiu, en la linio 1ª, uzurpas la rolon de s-ro EKGOJIS.

La t.n. SAMIDEANA kaj SALUTO, kiuj aperas en la linio 7ª sen la deviga finaĵo "n".

La t.n. PERSONA kaj KONATULO, al kiuj okazas same en la linio 14ª.

La t.n. DEPARTAMENTO, kiu, en la linio 20ª, akaparas postenon de s-ro DEPARTEMENTO.

ARESTITO EN LA PAĜO 11ª

La t.n. PORCIGU, kiu, en la linio 12ª, uzurpas la oficon de aliulo, ekzemple, s-ro DISTRANĈU.

Doninte al ĉiuj supre menciitaj deliktuloj po kvin batojn per la verda stelo (po unu bato per ĉiu stelpinto), ili estis liberigitaj.

LA KOMISARO
Al. ZIBJADO

Niaj Geamikoj el....

....Bulgario

" EL LA MUZIKA PASINTECO DE GABROVO "

Stefan Prodanov, Kina Prodanova

ANTAŬPAROLO

Esplorado de la kultura historio de Bulgario estas grava kaj urĝa tasko, kiu antaŭlonge atendas sian solvon. Ĝi estas kunligita nedisigeble kun universala - kaj politika historio de nia lando kaj povas doni plenan imagon pri la specifaj karakterizaĵoj de la nacio, de tiuj trajtoj, kiuj difinas la karakterizon de nia popolo.

Speciale la historio de la bulgara muzika arto estas unu neplene kaj nesufiĉe disvolvita sfero, kie la manko de fidindaj sciigoj kaj faktoj kaŭzas "vakuon," kiu devas esti plenigita. En tiu aspekto la libro "EL LA MUZIKA PASINTECO DE GABROVO", de Stefan Prodanov kaj Kina Prodanova, reprezentas valoron, kiu lumigas gravajn historiajn momentojn, ne nur el la historio de Gabrovo, sed ankaŭ el la historio de la bulgara muzika kulturo. La riĉa kaj ordigita faka materialo enhavas gravajn informojn, kiuj ne troviĝas en ekzistantaj ĝis nun verkoj pri la historio de la bulgara muzika kulturo. Ĉe plie: iuj neekzaktaj faktoj kaj informoj, kiujn enhavas similaj verkoj, povas esti korektitaj per historiaj ekzaktaj faktoj en la libro "EL LA MUZIKA PASINTECO DE GABROVO".

Speciale interesaj momentoj kaj faktoj estas: enkonduko de la kantado kiel deviga lernobjekto, unua sistema kolekto de bulgaraj popolaj kantoj de V.E.Aprilov kaj unua instruisto en Gabrova lernejo Neofit Rilski, kanta talento de la disvastigantoj de la bulgara revolucia spirito, informoj pri unu el unuaj bulgaraj orkestroj, pri unu el la unuaj bulgaraj muzikaj gazetoj "Harmonio". Specialan atenton meritas la ĉapitroj dediĉitaj al la laborista, partizana kaj politika - malliberula muzika amatora agado.

Estas farita grandega esplora laboro, kiu reliefigas la signifon de Gabrovo kiel unu el la plej malnovaj kulturaj centroj de Bulgario, kun eksterordinare grava rolo en ĝia kultura disvolviĝo. Specialan intereson prezentas granda nombro da fotografaĵoj kiel ilustra materialo.

(daŭrigo sur la 8ª paĝo)

Pentroarta kritiko

"Hodiaŭ ni troviĝas antaŭ specimeno de la homa talento, kiu pere de la pentroarto montras la diversajn kaj specialajn aspektojn kaj facetojn de la kulturo. La pentroarto estas unu el la signoj plej trafaj por montri la evolucion de la homo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. La pentroarto estas la historio mem de la homo, ĝi estas plastika vidaĵo de la homa kapableco. La pentroarto estas la plej bona libro malfermita al la venontaj generacioj.

Nu, jen ĉi tiu pentraĵo. Oni devas ĝin atente trarigardi kaj analizi. Antaŭ ĉio la artisto deziris reliefigi la forton de la farboj, kiel specimeno de la naturo kaj ĝian influon en la vivo de la homo. Se vi atente rigardas ĉi tiun artan pentron, tuj vi altiros la konkludon pri la grandioza talento de la artisto. Ŝajna kvazaŭ pere de ĉi tiu farba miksaĵo la artisto volus translokigi la belecon de la naturo en ĉi tiun tolaĵon. Tiuj altiraj koloroj, kiuj fiksas niajn okulojn estas la forto de la lumo, kiu ligе kun la ĝusta kaj ekzakta pozicio de la pentraĵo, montras al la homo la rolon de la arta pentrado kiel ilo de komunikado inter la homaj estaĵoj.


Eble por iuj personoj ĉi tiu pentraĵo havas nenian signifon. Por ĝin kompreni plej bone ni devas profundiĝi en la menson de la artisto kaj de lia skolo. La abstrakta stilo estas unu el la plej grandaj plastikaj esprimoj, ĝia enhavo estas pura, ne makulita per neniu senvalora kaj palpebla ordinara substanco. La rigardanto havas, antaŭ la abstrakta pentrostilo, la kampon liberan por ke lia imago vagadu tra la diversaj pensomanieroj kaj gustoj, kiuj nestas en la subkonscio de ĉiu amanto de la pentroarto. La artisto de la abstrakta stilo unike, sole, montras vojeton en la granda arbaro por ke la studemulo de ĉi tiu pentrosistemo analizu kaj proprasperte malkovru la valoran talenton de la artisto.

Sed ni revenu denove al la majstra specimeno de nia hodiaŭa artisto kaj konkrete ni daŭrigu la studo-analizon de la jam parte priparolita pentraĵo, ĉar ja estas la kulmino de la pentra kapableco de nia amiko. Nu, ni povas konstati, ke la artisto tute intence rondigis la figuron aŭ formon de la pentraĵo, kio jam havas klarigon: efektive ĝi montras la teran sferon, kio ŝajnas, kvazaŭ la artisto volus alproksimigi la universon.

Evidente tio jam estas ideo, kiu restas for de la homa kapableco, sed jen fakto de la senmezura esprimado pere de la arta pentro. Tiu bulo, malgraŭ ĝia grava ronda signifo estas lokita en kvadrata tolaĵo. Kial ? Por la artisto la kvar anguloj tute blankaj estas fenestroj de la vivo tra kiuj venas la ekstera lumo. Ĝi estas kanto al la vivo kaj, ĉu vi povas imagi la efektojn vidan kaj spiritan, se tiuj kvar anguloj aperus nigre pentritaj ? Por la artisto venas tra tiuj kvar blankaj anguloj, la suno, la luma forto, kiuj donas vivon al la pentraĵo.



Fakte, ni povus dum longa tempo eks plikadi la artajn valorojn de ĉi tiu verko. Ĝia entuta enhavo estas tiom grandioza, kaj ĝi enhavas ĉiujn konceptojn pri la homa vivo, pri la naturo pri la universo. Permesu,ke mi iomete parolu pri la - laŭŝajne nelogika, hazarda aŭ kaprica uzado de la farboj. La artisto ne intencas klasifiki la kolorojn,kvazaŭ ĝi estu flago de iu nacio, kie ĉiu koloro havas sian difinitan lokon absolute neŝanĝeblan. Tiu ne orda distribuo de la koloroj estas unu el la plej geniaj nuancoj de la artisto. Ĉu la naturo ne estas senmezura miksaĵo de ĉiuj koloroj ekzistantaj aŭ - konataj de ni?



Resume, jen grava arta verko,kiu montras novan formon por rigardi kaj analizi nian opinion kaj filozofion pri la vivo. Gi efike helpas nin koni la medion, en kiu disvolviĝas nia ĉiutaga batalado kaj la diversaj naturaj fenomenoj, kiuj estas parto grava kaj tre influa de nia karaktero. Tiu ĉi pentraĵo estas kiel spegulo kie reflektiĝas nia propra vivo pro kio unike dependas de ni, ĉu ni estas kapablaj koni nin mem. En tiu senco ĉi tiu pentraĵo estas la plej granda helpilo, kiun vi povas trovi. Nur de ni dependas ĝian ĝustan interpretadon kaj analizon" .

Tiamaniere parolis la kritikisto pri pentroarto, apud la pentraĵo.

LUIS SERRANO PEREZ

SABADELL

(daŭrigo de la 6ª paĝo)

En la verko impresas ankaŭ alia cirkonstanco, kiu havas specialan signifon por nuntempa leganto. La aŭtoroj konstatas profundajn ligojn de nia kulturo, kun rusa kulturo, emfazas ĝian signifon kaj influon en la procedo de maturiĝo de nia nacia konscio, kiel unu el la apogoj de la bulgara revolucia spirito. Konvinke kaj kredinde - estas malkaŝitaj la vojoj, sur kiuj penetras kaj fortikiĝas la influo de la rusa kulturo kiel potenca faktoro, havinta grandegan rolon, kies profunda senco estas de especiala signifo por nuna momento.

Altvaloraj sciigoj pri la ĥora agado en Bulgario, ekkreiĝo de la profesia muzika arto kaj speciale la interesaj pensoj pri la popola kanto kompletiĝas ĝeneralan karakterizon de la verko "El la muzika pasinteco de Gabrovo" enhavas, ne nur valorajn historiajn informojn, sed ankaŭ kernon de scienca esplorado. La publikigo de tia libro estas utila por la komuna afero de la bulgara nacia muzika kulturo.

BOJANA PRODANOVA

(AKROSTIKO)

Ju pli li laboras, des pli li mirigas.
Unika li estas por iu ajn tasko.
Lerteco simila nin ĉiujn instigas
Imiti lin ĉiam (Por nia fiasko!!).
Obstakloj forestas en lia laboro.

Aktivas li ĉie efike sen peno.
Reale, li vivas en daŭra dejoro,
Giganta vigleco, sindona sinteno,
Utilon donanta al nia Movado.
Ekzemplo li estas de samideano
Luktanta por venki, per digna strebado,
La barojn survoje al paca lontano.
Ekkiu, honore al tia agado:
Saluton, amiko de tre lerta mano !!!

Alcibiado

Perán, 1983.09.16



JES, ONI LEGAS NIN!

JUAN RÉGULO PÉREZ
APARTADO 58
LA LAGUNA - TENERIFE
CANARIAS - ESPAÑA

02.09.1983

Karaj samideanoj amikoj de Astura Esperanto-Asocio,

Kiam por la unua fojo "Heleco" vizitis min, mi tuj danke akceptis la honoran alvenon de la honora [illegible] per letero, kiun, [illegible], vi ricevis. En tiu letero mi skribis, ke mi trovas la gazeton bona kaj ke mi, post lego, ĝin transdonis al nia Esperantista Societo de Tenerifo, ESTO, por plia diskonigo. Poste alvenis novaj kajeroj, kiujn mi ankaŭ legis, kaj, leginte, same transdonis al la Societo. Laste venis kajero, kiun akompanis via cirkulero de junio nunjara, per kiu vi demandas, ĉu mi ricevas vian gazeton kaj kion mi opinias pri ĝi; per la supraj vortoj iras al vi mia respondo. Mi volas aldoni, ke mi vin sincere gratulas pro via ĉiel laŭdinda laboro favore al la disvastigo de nia Lingvo Internacia.

Jak LE PUIL
[illegible]
PIERREFITTE
Tel. [illegible]

[illegible]
F. Rubió, s/n
HOJA (Barcelona)

, la 27-an de aŭgusto 1983

Karaj gesamideanoj!

Mi respondas vian leteron de junio 1983.

Mi bone ricevas HELECO-n, kaj mi kore gratulas vin ĉar estas interesa, diversa kaj bela. [illegible]

[illegible] manko de [illegible] kaj numero, por kolektantoj estas tre grava, sed mi [illegible] vin.

Korajn salutojn

MADRIDA

★ ESPERANTO

LICEO

M E L
[illegible]

Madrido 6-an Septembro 1983

Karaj gesamideanoj:

Ni ricevis vian cirkuleron petante opinion pri via revuo "HELECO".

Certe ni ricevas ĝin kaj krome ni ŝatas ĝian enhavon, do ni petas al vi daŭrigi vian sendadon.

Hispana agrikulturisto
[illegible] de A.E.A.
[illegible] legantoj
[illegible]
[illegible]
[illegible]

[illegible]

[illegible], [illegible] al [illegible]
de [illegible] de "La [illegible]".

Jak LE PUIL

Estimataj,
[illegible] mi ne silentis... [illegible]
[illegible] vian organon!

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ
LA VICSEKRETARIO · HISPANA SEKCIESTRO
NACIA KOLEGIO · ESPERANTO-KURSOJ
CALLOSA DE SEGURA - ALICANTE - HISPANIO

La 14-an de aŭgusto 1983

ASTURA ESPERANTO - ASOCIO
Enrique Cangas, 25
G I J O N -6- (Asturias)

Altestimataj s-anoj kaj karaj amikoj!

Post la ĉeesto en el la Internacia Konferenco de I.L.E.I. en SINTRA -Portugalio-, la Hispana Kongreso de HEF en ZARAGOZA, k.s., alvenante al nia sidejo, bonvenigas nin " HELECO " kaj via incida Letero-Cirkulero.

Por via informo, kaj je la nomo de ILEI kaj de la Esperanta Grupo, ni devas diri, ke " HELECO " ĉiam estas por ni vera regalo. Ni legas ĝin sen interrompe, unuafoje de la titolpaĝo al la dorskovrilo. Kaj por la numero 32, majo-junio 1983, inkluzive " Kuiranto kun Pilar ".

Krome, siamaniere, per faktoj, ni jam esprimis nian pensmanieron rilate " HELECO ", la Astura Esperanto Asocio - GIJON kaj unu el ĝia elstara membro, ankaŭ ILEI-ano, prof. Sakramento COLLADO, pri kiu ni estas speciale fieraj.

Ni profitas la okazon por rememorigi al

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO
(HISPANA ESPERANTO FEDERACIO)
Apartado 119
VALLADOLID
(España)

Valladolid 1-an septembro 1983-a

Astura Esperanto-Asocio
Enrique Cangas 25
GIJON-6

Estimataj gesamideanoj!

Ni deziras esprimi nian gratulon pro la regula sendo de via organo "HELECO", kiun ni ricevas senerare, kaj kiu ĉiufoje aspektas pli bela, speciale nun per nova kovrilo.

En la numero 32-a (Majo-Junio 83-a) ni konstatas la unuan artikolon de ADONIS kaj la suspekton pri la ebla manko de legantoj. Almenaŭ niaflanke, estu certaj ke ni legas atente vian revuon kaj ke ni, konsideras ĝin plej komplete ĉiunumere. Tamen, pro manko de la bezonata [illegible] ni ne rapide reagis per frua respondo.

Ĉiam antaŭen en via por esperanta agado!

Samideane kaj amike,

[signature]

BULGARA ESPERANTISTO
ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO
bul. Hristo Botev 97, 1000 Sofio, Bulgario
P. K. 98, 1000 Sofio
tel. 81-60-20, [illegible]

Sofio, 30.08.1983
№ 91

Al Astura Esperanto-Asocio,
Enrique Cangas, 25
GIJON - 6 (Asturias)

Karaj gesinjoroj,

Ni tre dankas pro Via letero de junio 1983.

"Heleco" estas modesta periodaĵo kun bedaŭrinde malmultaj kaj ne tre interesaj materialoj. La grafika aranĝo estas iom malnovmoda. La gazeta paĝspaco estas malŝpareme uzata. La redakcio de "Heleco" povas ĉerpi utilan sperton de aliaj E-periodaĵoj, eldonataj je la sama grafika maniero.

La redakcio de "BE" plu ricevadas plezure Vian bultenon "Heleco"

Kun sinceraj salutoj

BULGARA ESPERANTISTO
[illegible]
1000 Sofio - Bulgario
ĉefredaktoro:

Jen la atesto pri kion ni asertas supre.

Ne nur oni legas nin, sed eĉ la plejmulto de niaj legantoj ŝatas nian modestan gazeton.

KUIRANTE KUN PILAR

MAKARONIOJ KUN FROMAĜO

INGREDIENCOJ: 140 g. da makaronioj.
60 g. da butero aŭ margarino.
6 supkuleroj da raspita fromaĝo.
pipro kaj salo.
lakto.
paneroj.

Pecigu la makaronioj kaj metu ilin en kaserolon ; kovru ili per sufiĉe da salumita akvo.

Kuiru kaj kuiretu ĝis moliĝo; deprenu la akvon tra kribrileto.

Aldonu 30 g. da butero aŭ margarino, salon, pipron kaj 3 supkulerojn da fromaĝo; miksu ĉion bone kaj aldonu sufiĉe da lakto por malsekigi la tuton.

Metu en buterumitan bakpladon, surŝutu la restantan fromaĝon la panerojn kaj malgrandajn pecojn da butero.

Bakų ĉion en bakforno varmigita je alta temperaturo, ĝis orbruneco.

BONAN APETITON !